



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

LA VESPERMANĜO

EL BALTASAR DE ALCÁZAR

En Ĥaen', kie mi loĝas,
 Don Lope de Sosa vivas
 kaj pri li mi tuj rakontos,
 Agnes', aferon mirindan,
 Sendube la plej strangan
 Kiun vi estas aŭdinta.
 Tiu Sinjor' portugalon
 Havis al servado sia...
 Sed unue vespermanĝon,
 Ĉu vi ne samopinias?
 Jam estas la tablo preta,
 La manĝaĵoj aranĝitaj,
 La vintasoĵ atendantaj
 Nur la komene' prokratista.
 Ni komencu per freŝ-vino
 Sed benu ĝin, fratin' mia,
 Ĉar la vinon tuj trinkotan
 Mi signofari kutimas.
 Mia vinglut' estis longa,
 Sed la fel-vinujon dikan
 Alŝovu, ĉiu vinguto
 Pli ol floreno meritias.

El kiu drinkej' ĝi venis?
 Sendube de la Kastilja
 Tie vin' estas karega,
 Ĉar malkara ne troviĝas.
 Alkocera la drinkejo
 Pli ol min' estas profita,
 Granda konsolo, ke ĝi
 Estas ja najbaro nia.
 Ĉu drinkej' estas moderna
 Eltrov', mi tute ne scias,
 Sed je Di' plej delikate
 Estas drinkej' eltrovita.
 Ĉar en drinkejo mi petas
 Pri vin' kiam mi soifas,
 Mi ricevas, trinkas, pagas
 Por ĝi kaj gaje foriras.
 Agnes', mi tion ne laŭdas
 Ĉar ĝi per si mem laŭdiĝas,
 Nur difekton mi konstatas,

Al sia fin' ĝi rapidas.
 La pipre-sauca viando
 Kaj salato jam finiĝas,
 Sed nun venas Sangkolbaso,
 Sinjorin' plej respektinda,
 Kiel pompa, kiel bela.

Estas ŝi ĵ kiel grasdika!...
 Sajnas, Agnes', ke ŝi venas
 Nur kun celo renkontiĝa.
 Nu, pro mallarĝa glutvojo,
 Eniru ŝi kuntirita;
 Akvon en vinon ne verŝu,
 Ĉar la ventro skandaligias.
 Englutu maljunan vinon
 Kaj vi manĝos, Agnes' mia,
 Pli frande; vi saĝe faras
 Ĉar la konsilon profitas.

Sed diru, ĉu vi ne ŝatas
 La sangokolbason riĉan?
 Sendube pro l'troa spico
 Ĝi kiel demono pikas.
 Sangkolbas' kun pinisemoj
 Eĉ de korteganoj inda,
 Rostita de viaj manoj,
 Kiuj porkidojn grasigas.
 Mia kor' krevas de ĝojo
 Ĉu ne same krevas via?
 Ne estas al vi plezure?
 Mi supozas vin feliĉa.
 Je Dio mi estas gaja
 Sed jen afero subtila:
 Ĉu tie ne pendis lampon
 Sajnas, ke m inun du vidas.
 Estas demand' superflua
 Kaj ĝian kaŭzon mi scias;
 Per la malsobra trinkado
 La pendlampoj duobliĝas.
 El vinkruĉo ni gustumu
 La nektaron plej trinkindan,
 Ĝi ne estas freŝa vino,
 Nek iel al ĝi similas.
 Kiel glita, kiel hela,
 Laŭ gust'kaj odor' ŝatinda
 Kia purec' kaj kolor'!

Ĉio plej taŭge kuniĝas.
Sed nun aperas fromaĝo,
L'olivoj glite glut iras,
Ambaŭ petas pri la helpo
De la glas' kaj kruĉo vinaj.
Manĝu l'fromaĝon, ĝi estas
Tiun de Pint' superinta

Kaj l'olivoj ne malbone
Plenumadas rolon sian.
Alŝovu plenan vinujon,
Kiel, Agnes', vi kutimas.
Ses glutajn ; For, tablotukon!
Vespermanĝ' estas finita.
Nu, ĉar ni tiel komforte
Estas, Agnes; jam manĝintaj
Sajnas, ke nun estas prave
Daŭrigi l'interrompitan
Rakonton pri l'portugalo.
Sed atentu, fratin' mia,
La portugal' malsaniĝis,
Kaj mi profunde dormiĝas
La deknua sonoritas...
Pardonu, ke mi ne finas.

El la hispana lingvo libere tradukis,

VICENTE INGLADA.

Esperanto en la Lernejon kaj la Praktikon

En Vieno okazos de l' 1924 Majo, Internacia Konferenco sub la devizo. "Esperanto en la Lernejon kaj la Praktikon". Ĝi estas sub la protekto de l' Konfederacia Prezidanto de Aŭstrio kaj sub la Honora Prezido de l' Kanceliero de Aŭstrio. La Ministerio por Komercio kaj Trafiko disponigis la necesan monon por la preparaj laboroj.

Estas invitataj partopreni el la kampo de komercio kaj industrio; komercaj ĉambroj, foiroj, ekonomiaj unuigoj de ĉiu speco, komerc-lernejoj kaj fak-asocioj; el la kampo de trafiko; fervoj-kompanioj; trafik-unuigoj, entreprenoj de ŝip-kaj aerveturado, radio-kompanioj, hotel-organizaĵoj; el instrua sfero; intruo-aŭtoritatoj, universitatoj, altlernejoj, instruistaj organizoj, film-kompanioj kaj klerig-asocioj. La partopreno de instru-ministerioj, plue de ministerioj de trafiko, fervojo kaj de poŝto estas antaŭvidita kaj la partopreno de kelkaj registaroj jam certigita.

La Konferenco ne nur montru denove la ĉiutage pligrandiĝantan, sukcesan uzadon de Esperanto, kiel helplingvo, sed per vasta akcelado ankaŭ certigu la enkondukon en la lernejon kaj la praktikon.

Tial ke la celo de la konferenco estas interese kaj klare difinita, U. E. A. petas, ke ĉiuj esperantistoj informu la sekretariejon de la Konferenco pri invitindaj aŭtoritatoj, korporacioj, institucioj aŭ eminentuloj, kiuj interesiĝas aŭ povas interesiĝi pri nia programo, same pri personoj ne-esperantistaj, sed fakuloj, kiuj aprobe sintenas al nia lingvo kaj per sia sperto povas kontribui al la temoj.

De la Ministerio por Komercio kaj Trafiko ni ricevis, pere de Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno, esperant-faldprospektojn, invito al tiu Internacia Konferenco. Ĝi estas tre bele eldonita, entenas belajn fotografajojn kaj landkarton el Aŭstrio. Sro. Fritz Stockinger, Ministro por

Komercio meritas dankon de ĉiuj esperantistoj pro la granda helpo al tiu interesa Konferenco kaj pro la eldono de tiu bela prospekto; li ankaŭ parolis en Esperanto por Radio-Vieno la 11^{an} aprilo.

Kiu volos tiun novan gvidfolion kaj tiun de la urbo Vieno sendu i respondkuponon al Internacia Esperanto-Muzeo. Vieno. I. Neue Burg.

LA SIMIA MANO

I

Ekstere la nokta vetero estis malvarma kaj malseka, sed en la saloneto de somerdomo Laburnum la fenestraj sirmiloj estis etenditaj kaj fajro gaje brulis.

La patro kaj la filo ŝakludis, la unua, kiu havis pri tiu ludado siajn proprajn ideojn, kiuj postulis radikalajn ŝanĝojn, metis sian reĝon en tiel grandajn kaj nenecesajn danĝerojn, ke li provokis eĉ la homentariojn de la maljuna, blankhara sinjorino trankvile trikanta apud la fajro.

"Aŭskultu, kiel la vento siblas", diris Sro. White, kiu rimorkante tro malfrue fatalan luderaron deziris distri sian filon, por ke li ne ĝin vidu.

"Mi aŭdas ĝin", diris tiu ĉi atentege rigardante la ludtabulon, dum li etendis sian manon. "Ŝako".

"Mi konsideras tre malprobabla lian venon ĉi tiun nokton", diris la patro kun sia mano etendita sur la ludtabulo.

"Mortsako", respondis la filo.

"Tio ĉi estas la sekvo de loĝado en tiel malproksima loko", krisis Sro. White kun subita kaj neatendita kolero; "el ĉiuj malpuraj kaj kote-maj loĝlokoj ĉi tiu estas la plej malbona. La voje-to estas ja marĉo kaj la vojo, torento. Mi ne scias kiamaniere oni pensas. Eble, ĉar du domoj en la tuta vojo estas luataj, oni opinias, ke tio ne baras".

"Ne incitiĝu", diris lia edzino milde; "eble vi venkos la proksiman fojon".

Sro. White rigardis alten ĝuste en la momento, kiam patrino kaj filo interŝanĝis konsentan rigardon. La vortoj mortis en liaj lipoj kaj ĉe lia duonblanka barbo sin kaŝis kulpa grimaco.

"Li jam estas tic", diris Herbert White aŭdante, ke la kradpordo brue fermiĝis kaj pezaj paŝoj alproksimiĝis.

La maljunulo sin levis kun gastema rapideco kaj malfermante la pordon komencis kondolenci la ĵus alvenintan personon. Ĉi tiu ankaŭ plendis pri la veteraĉo kaj vojo tiom, ke Sino. White ekdiris, "Ho, ho!" sed ŝi tusetis pro ĝentileco, kiam vidis sian enirantan edzon sekvatan de alta, dika viro malgrandokula kaj ruĝvizaĝa.

"Ĉefserĝento Morris", li diris prezentante lin. La ĉefserĝento manpremis ĉiujn kaj akceptis la lokon apud la fajro, kiun oni prezentis al li, rigardante ĝoje sian gastiganton, dum ĉi tiu alportis viskion kaj glasojn kaj metis ĉe la fajron malgrandan, kupran poteton.

Je la tria glaso liaj okuloj komencis brili kaj li ekparolis al la malgranda familio ronde rigardanta kun arda atento tiun vizitanton el malproksimaj landoj, dum li oportune apogis siajn larĝajn ŝultrojn sur la dorsapogilo de sia seĝo kaj rakontis

tadis pri sovaĝaj agoj, pri militoj kaj plagoj kaj strangaj popoloj.

“Dudek unu jaroj de tiam”, diris Sro. White parolante sian edzinon kaj filon. “Kiam li foriris estis knabeto destinita por la magazeno. Nun vidu lin”.

“Li ne ŝajnas tiom multe suferinta”, diris Sino. White ĝentile.

“Mi dezirus iri en Hindujojn”, diris la maljunulo; “kompreneble nur por scivoleti ion”.

“Pli bone vi estas tie ĉi”, diris la ĉefserĝento movante sian kapon. Li metis la malplenan glason sur la tablon sopiretis kaj alifoje movis ĝin.

“Mi dezirus vidi tiujn malnovajn templojn kaj fakirojn kaj jonglistojn”, diris la maljunulo. “Kio estas tio, kion vi komencis rakonti al mi la alian tagon pri simia mano aŭ io simila, Morris?”

“Nenio”, diris la militisto rapide. “Almenaŭ nenio rakontinda”.

“Simia mano!”, diris Sro. White scivoleme.

“Nu, tio estas nur afero, kiun oni eble konsideras, kiel magia”, diris la ĉefserĝento trankvile.

Liaj tri aŭskultantoj klinigis antaŭen avide. La ĉefserĝento alproksimigis neatente al siaj lipoj la malplenan glason kaj tuj lasis ĝin alifoje surtablen. Lia gastiganto plenigis ĝin.

“Unuavide”, diris la ĉefserĝento serĉante ion en sia poŝo, “ĝi estas ĝuste ordinara, simia mano seka, kiel tiu de mumio”.

Li eliris ion el sia poŝo kaj prezentis ĝin. Sino. White, movis sin posten kun grimaco, sed ŝia filo ĝin prenis kaj ekzamenis scivoleme.

“Nu, kio estas neordinara en ĝi?”, demandis Sro. White, kiam li prenis la aĵon transdonitan de sia filo kaj post ekzameno metis ĝin sur la tablon.

“Ĉi havas iun povon, kiun donis al ĝi maljuna fakiro”, diris la ĉefserĝento, “tre sankta viro. Li deziris pruvi, ke la sorto regas la vivon de la personoj kaj, ke tiuj, kiuj provas ŝanĝi ĝin, altiras tiamaniere sian malfeliĉon. Li metis en ĝin la povon, ke tri apartaj personoj povas atingi la realiĝon de tri deziroj po ĉiu el ili”.

Lia sintenado estis tiel impresiga, ke liaj aŭskultantoj instinkte komprenis, ke ilia skeptika rideto estis tute nekonvena.

“Nu, kial vi ne atingas viajn tri dezirojn, sinjoro?”, diris Herbert White nekredeme.

La militisto rigardis lin, kiel la plenaĝuloj kutimas rigardi la tromenfidajn junulojn. “Mi jam faris tion”, li diris, kaj lia ruĝa vizaĝo paligis.

“Kaj ĉu vi atingis reale viajn tri dezirojn?”, demandis Sino White.

“Mi atingis ilin”, li diris, kaj lia glaso samtempe tremuŝis lian fortikan dentaron.

“Kaj ĉu neniu alia estis deziranta? redemandis la maljuna sinjorino.

“La unua atingis siajn tri dezirojn. Jes”, li respondis; “Mi ne scias el kio konsistis la du unuaj, sed la tria alportis morton. Tiel mi ekposedis la manon”.

Lia voĉtono estis tiel serioza, ke silento falis sur la grupon.

“Se vi jam atingis viajn tri dezirojn, ĝi taŭgas al vi por nenio, do, Morris”, diris la maljunulo fine. “Kial vi gardas ĝin?”.

La militisto balancis sian kapon. “Pro kaprico,

mi pensas”, diris li malrapide. “Mi intencis iam ĝin vendi, sed mi ne sukcesis pri tio. Ĉi kaŭzis jam sufiĉe da malbono”.

“Krome neniu volas aĉeti ĝin Ili opinias, ke ĉi tio estas fejnrakonto; kelkaj personoj kaj tiuj, kiuj kredas ion pri ĝi, deziras unue provi kaj poste pagi”.

“Kaj, se vi povus atingi aliajn tri dezirojn”, diris la maljunulo rigardante lin fikse, “ĉu vi volus ilin atingi?”.

“Mi ne scias”, diris la alia. “Mi ne scias”.

Li prenis la manon kaj, movante ĝin inter siaj dika kaj montra fingroj, subite jetis ĝin en la fajron, White eligante nevolan, malgrandan krion, kliniĝis antaŭen kaj reprenis ĝin.

“Estas pli bone”, diris la militisto solene, “lasi ke ĝi brulu”.

“Se vi ne ĝin bezonas, Morris”, diris la alia, donu al mi ĝin”.

“Ne mi ĝin jetis en la fajron”, diris obstine lia amiko. “Se vi gardas ĝin, ne kulpigu min okaze de malfeliĉo. Ĝetu ĝin en la fajron, estu saĝa”.

La alia skuis sian kapon kaj ekzamenis sian novan posedadon de proksime. “Kiel estas necese agi?”, li demandis.

“Tenu ĝin alte sur via dekstra mano kaj diru laŭte vian deziron”, diris la ĉefserĝento”, sed mi avertas vin kontraŭ la sekvoj”.

“Tio ĉi estas kvazaŭ el Mil kaj Unu Noktoj”, diris Sino. White, dum ŝi leviĝis kaj komencis pretigi la vespermanĝon. “Ĉu vi ne opinias bona afero deziri por mi kvar manparojn?”.

Sia edzo tiris la talismanon el sia poŝo kaj ĉiuj tri ekridis vidante, ke la ĉefserĝento kun maltrankvila mieno kaptis lin per lia brako.

“Se vi deziras peti ion”, li diris akre, “petu saĝajon”.

Sro. White metis ĝin alifoje en sian poŝon kaj alproksimigante seĝojn sidigis sian amikon ĉe la tablon.

Dum la vespermanĝo la talismano estis preskaŭ forgesita kaj poste ĉiuj tri sidis aŭskultante absorbate la duan parton el liaj soldataventuroj en Hindujo.

“Se la afero de la simia mano ne estas pli vera, ol la historioj, kiujn li rakontis al ni”, diris Herbert, kiam la pordo fermiĝis post ilia gasto, kiu havis nur la ĝustan tempon por uzi lastan vagonaron, “ni ne atingos multon el ĝi”.

“Ĉu vi pagis ion por ĝi, karulo?” demandis Sino. White rigardante sian edzon de proksime.

“Malmultajon”, li diris iom ruĝiĝante. “Li ne volis akcepti ĝin, sed mi lin devigis. Li insistis pri tio, ke mi detruu ĝin”.

“Neniel” diris Herbert afektante teruron. “Ni tuj estos riĉaj kaj famaj kaj feliĉaj. Deziru esti imperiestro, paĉjo, por komenci; tiel vi ne povos esti mizerulo.”

Kaj li ekkuris ĉirkaŭ la tablo persekutate de lia ŝercofendita patrino, armita per apogseĝa kovrilo.

Sro. White tiris la simian manon el sia poŝo kaj rigardis ĝin hezite. “Fakte mi ne scias, kion deziri”, li diris malrapide. “Ŝajnas al mi, ke mi havas ĉion, kion mi bezonas”.

“Se vi povus pagi la tutan familian ŝuldaron, vi ja estus tute feliĉa. Ĉu ne? diris Herbert me-

tante sian manon sur lian ŝultron. Nu, deziru ducent funtojn; tio estas sufiĉa”.

Lia patro hontridante sian propran kredemon levis alten la talismanon, dum lia filo kun solena mienio iom fuŝata de okulgesto, kium li direktis al sia patrino, sidigis antaŭ la piano kaj ludis kelkajn impresigajn akordojn.

“Mi deziras ducent funtojn”, diris klare la maljunulo. Surdiga klavbruo substrekis ĉi tiujn vortojn, interrompate de ektima krio de la patro. Lia edzino kaj filo kuris al li.

“Ĝi moviĝis”, li diris kun abomeno al la ajo, kiu kuŝis sur la planko. “Dum mi diris mian deziron, ĝi turniĝis sur mia mano kvazaŭ kolumbro”.

“Nu, mi ne vidas la monon, diris lia filo prenante la manon kaj lasante ĝin sur la tablo. “Mi vetas, ke mi neniam vidos ĝin”.

“Tio estis certe imagajo, karulo”, diris lie edzino rigardante lin maltrankvile.

Li skuis sian kapon. “Estas same; neniu malbonajo okazis, sed ĝi kaŭzis al mi ektimon”.

Ili sidigis ree antaŭ la fajron, dum ambaŭ viroj elfumis siajn pipojn.

Ekstere la vento estis pli forta, ol antaŭe, kaj la maljunulo ekmoviĝis nerve aŭdante la bruon de fermiĝanta pordo ĉe supera etaĝo. Nekutima kaj malkuraĝiga silento ekregis la tri personojn ĝis, kiam fine la maljuna paro leviĝis por iri en sian dormoĉambron.

“Mi opinias, ke vi trovos la monon en dikan sakon meze sur via lito”, diris Herbert, kiam li noktadiaŭis ilin, “kaj ke io terurega duonkaŝita sur la supro de la komodo spionos vin, dum vi enpoŝigas viajn nehoneste akiritajn monerojn”.

Li restis sola sidante en mallumo kaj rigardante la estingiĝantan fajron, kiu kvazaŭ ekpresentis vizaĝbildojn. La lasta el ili estis tiel simia kaj tiel kvazaŭ vivanta, ke li kun trudita rideto iris serĉi sur la tablon glason kun akvo por jeti ĝin sur la fajron.

Lia mano ektuŝis la talismanon kaj kun nervoskueto li viŝis ĝin sur sian jakon kaj foriris liten.

El angla lingvo, tradukis,
R. DE SALAS.

PERSISTEMECO

La plej rimarkinda epoko pri la hispanaj belaj artoj estis dum la regado de la reĝo Filipo IV^a, princo, kiu bone komprenis kaj eĉ ekercis la artojn.

Estis por li granda gloro protekti poetojn kaj artistojn, pro tio, kiam oni lin sciigis pri la provpentraĵoj de la poste eminenta pentristo Velazquez, la artema reĝo pretiĝis por helpi lin.

Kiel glora tago por Velazquez estis kaj por ĉiuj hispanoj tiam, kiam la propraj artistoj, vidante la rajdantan figuron de la reĝo sur la portreto, belege pentrita, nomis Velazquez “Princo de la Pentrado”!

Eminentaj, hispanaj kaj fremdaj pentristoj: Carducci, Caxeti, Angelo, Nanii, k. t. p., distin-

gindaj profesoroj, ankaŭ rimarkigis al la reĝo la superecon de la pentraĵoj de Velazquez.

Li nur, Velazquez, atingis la honoron pentri la portreton de la reĝo, ĉiuj buŝoj laŭdis lin kaj eĉ la enviaj silentoj kaj murmuroj helpis por aplaudi la seviljan pentriston.

Tio estis pro la ecoj, kiuj liajn pentraĵojn beligis, ĉar, kiu estis pli vera ĉe la koloro, pli supera sur la klaro-malklaro, pli diversa en la karakteroj?

Li sola el ĉiuj per saĝa laboro kaj belegaj lumoj donis vivantan animon al la figuroj de li pentritaj, sed tian majstran laboron li povis atingi fari nur pro la grandega revo kaj persistemo, kiujn li havis eĉ dum malbonaj tempoj.

Pro tio, ni, geesperantistoj, neniam devas laciĝi, ĉiam ni havu la belan revon pri nia celo, ĉiam ni estu persistaj pro nia esperanta idealo kaj tiel, ni fine venkos.

PILAR SALVO GONZALEZ.

PERDO POR FRATECO

Nia ĝisnuna Prezidanto de Frateco kaj Direktoro de NIA VIVO Sro. Emilio Bruquetas ĵus estis destinata pro kariera pligradigo en Barcelon'on. Tio estas ja gravega perdo por nia Societo, ĉar lia inteligenta, fervora kaj trafa agado ĉe ni estas malfacile anstataŭebla.

Frateco de tie ĉi esprimas al sia karega Prezidanto kaj bonega amiko sian bedaŭron pro la disigo kaj samtempe tutkore lin gratulas pro lia meritita pligradigo kaj destino en la katalunan urbon, kie ni deziras al li tre feliĉan loĝadon.

LA APRILA NUMERO

Pro ĝenerala striko en Zaragozo 35 tagojn daŭra la aprila numero de NIA VIVO tute ne povis aperi. Ni bedaŭras la okazon.

SCIIGOJ

La esperanta grupo “Bela Espero” el Manresa, kiu dum kelke da silentis, denove komencas labori por la esperanta movado. Ĝi lokiĝis de “Ateneo Obrer Manresá”. Ni tutkore salutas ĝin kaj deziras plenan sukceson en ĝia esperanta agado.

* * *

En Barcelono, kie li loĝis, mortis la 28^{an} de la pasinta monato la patro de nia estimata samideano Sro. R. Argelich, al kiu ni esprimas plenan kondolencon pro tiu malfeliĉajo.